



TEA-BULTENO

12^A JARO

SEPTEMBRO - OKTOBRO 2009

NUMEROJ 9-10

La rivera akvo, kiun vi tuŝas, estas tiu lasta fluinta kaj la unua ekfluanta. Tia estas la nuno.

Leonardo da Vinci

Kara legantaro!

Varmo, varmegego, varmegego ankoraŭ turmentas nin, precipe turmentis/as tiujn kiuj ne feriadis dum la tuta, forne arda, periodo. Ĉuuu??? Ho, eĉ se vi flustras, mi aŭdas vin! Vi estas diranta ke nur pro envio mi, gale flava, tiele parolas ... ke mi ... mi eĉ ne scias, kioman suferadon vi devis paciencie kaj sanktule elteni, ekzemple dum la UK Bjalistoka...

Ho vi, kompatindulo(j), vi kiu(j) "devige" travivis la semajnon UK-an, kiu certe restos en ĉies memorujo longa-, longega-tempe, ne pro varma vetero aŭ pro kula pikado, sed pro la varma, varmega etoso kreita de partoprenantoj, de organizantoj, de surloka administrantaro, de bjalistokanoj, ĉiuj kune por digne celebri la 150^{an} naskiĝdatrevenon de nia Majstro Lazaro Ludoviko Zamenhof!

Mi ne estis tie, ne estis kun vi, sed same bone vivis multajn belajn momentojn prikongresajn danke al komputilo kaj interreto.

Vere dankindas la prizorgantoj de tiuj ttt-ejoj, kie oni povis sekvi ne nur legante, sed eĉ spektante, la diversajn eventojn okazantajn dum la 94^a UK.

"Bonhumora Zamenhofano" raportis (bedaŭrinde, ne tiom akurate, tamen ja oni devas esti komprenemaj, ĉar certe ili estis superŝutitaj de multaj laboroj) pri la diversaj okazaĵoj, programoj, legeblis raportoj pri inaŭguro, pri prelegoj, pri kunvenoj, salutvortoj de eminentuloj, aranĝoj eksterkongresejaj ...

Ankaŭ "Libera Folio" kontribuis per multe da artikoloj pri la diversaj

kongreseroj, eĉ legeblis iom da ... klaĉetoj, kiuj perfekte spicas la monotonan vivon de malgaja neparatoprenantino de UK. Tie kaj tie, videblis ankaŭ fotoj kaj filmetoj pri amikoj, nekonatuloj, gravuloj, vidindaĵoj de la naskiĝurbo de LoLo kio kontribuis kontentigi ankaŭ la okulojn!

Kio entuziasmigis min estis la apero de tiom da esperantaĵoj! Ne kredeble abunda elbakado! Stampoj, poŝtaj kartoj kun tre belaj bildoj, eĉ tutaĵo, medalo... Do, estis eblo plukadi en tre vasta tereno interesajn kolektaĵojn! Kio plej surprizis min estis la ZEOj ornamantaj domon en Bjalistoko: bedaŭrinde ke tiujn ne eblis aĉeti kaj kunporti hejmen!

Kion ankoraŭ diri? Nur ke fine ankaŭ mi ĉeestis kaj ĝuis nian jaran feston, kaj tial per renovigitaj forto kaj energio mi pretas reaktivi por disvastigado de nia lingvo, kune kun vi ĉiuj.

Pluraj estos la prilaborendaĵoj per kiuj ekos nia agad-kampanjo en Triesto: el tiuj tuj en septembro/oktobro, propagando pri kursoj kaj instruado.

Sed la ĉefa evento estos la Ekspozicio celebre de la 150^a naskiĝdatreveno de Lazaro Ludoviko Zamenhof, kiu okazos en la Salono *Fittke* (eksa *Albo Pretorio*, malantaŭ la urbodomo) ekde duono de novembro ĝis la 5^a de decembro. Por tion pretigi, estas tute superflue diri ke estas bezonataj ĉies helpo, ĉies ideo, ĉies kunlaboro: do, denove ni ĉiuj kune kiel dum IFEF-Kongreso, cele al brila sukceso, por Esperanto kaj por TEA!

Kore via Elda



Jen kelkaj el la esperantaĵoj-filatelajoj honore al nia Majstro!

Unu el la stampoj, uzitaj dum UK: surbilde, la naskiĝdomo de L.L.Z.

KIEN IRAS LA ITALA?

Dum somero, tagĵurnaloj kutime aperigas tipajn artikolojn, tempopasigajn aŭ plenplenajn de malsekretaĵoj. Sed ĉijare, en "Messaggero" de Romo, inter la diversaj titoloj, unu aparte, ne tiom distra aŭ supraĵa, kaptis mian atenton:

«Universitato, alarmo nov-aliĝintoj: tro da azenoj inter la flavbekuloj*»

Pri kio temas? La artikolo enfokusigas problemon, konatan jam ekde deko da jaroj. Ŝajne, la taksadotestoj (antaŭ enregistriĝo en la kursoj pri doktor-eco) montriĝas plenŝtopitaj per eraroj.

Pasintjare, ĉe Universitato "Ca' Foscari" en Venecio, 44% da enskribiĝintoj fiaskis. La obseda besto estas ortografio. Krome, ĉe testado pri logik-lingvistika sektoro, rezultis erara 25% da respon-
doj. Signifojn de elementaj vortoj aŭ esprimojn pluraj kandidatoj ne konis, eĉ ne konjugacion de neregulaj verboj. «Pensiga signalo – komentis la Rektoro – eble klariganta la sekvan forigon de la 20% da nov-aliĝintoj dum la unua jaro.»

La fenomeno disvastiĝas de Nordo al Sudo. «Unu el la plej grandaj obstakloj konsistas el la malabunda vortprovizo – rakontas Renato Lauro, rektoro de la dua Roma Universitato "Tor Vergata" – precipe kiam ĝi estas 'teknika' aŭ 'meze klera'. Pro tio ĉiuj flavbekuloj suferas pro malfacilaĵoj je kompreno, peze influantaj glatan studaŭrigojn.»

Okazas, ke studentoj eĉ alvenas ĉesojle de doktor-eco prezentante disertaciojn per eraregoj dissemi-
itajn: do, pluraj universitatoj startigas reakirkur-
sojn pri itala lingvo aŭ dediĉas la unuan jaron por 'refreŝigi' la licean programon, aparte pri scienca fako.

Do, la artikolo amplekse tuŝas gravan aspekton koncerne la preparadon de estontaj gvidantaj kla-
soj, emfazante la neceson trovi solvon al tiu vere
drama situacio en instrua kampo.

Sed. Sed, entute mankas analizo de la kialoj kon-
dukintaj al la nuna situacio.

Eble, respondo troviĝas en komento de 'Pigi22' ĉe la debatforumo pri la artikolo. Interalie 'Pigi22' skri-
bas: «Tiu ĉi estas signifa elemento, kiu lasas intucii
la ekziston de procezo emanta malaperigi eĉ la ita-
lan. Mi klarigas. Nun, jam ĉiuj manaĝeroj devas
paroli la anglan se ili volas finaranĝi negocon. Ĉiuj
sciencaj artikoloj estas skribitaj angle. ... Hodiaŭ la
angla (pro siaj karakterizoj kiel lingvo) estas kiel la
iama latina. Lingvo universala.» Klaraj kaj eksplic-
itaj vortoj de sincera junulo. Nuntempe la junularo
zorgas pri konkretaĵoj: en interreto kaj per poŝtele-
fonoj oni paroladas ege sin-teze, eĉ per sigloj –
x (*per*), 6 (*sei*), cq (*comunque*), nn (*non*) – do, pro
kio uzadi la italan?

Eĉ libreto publikiĝis: "Dolce Stil Web" [Dolĉa Stilo
Web, parafrazo de la titolo 'Dolce stil novo' de Dan-
te], aŭtoro Pino Bruno, minejo de informoj pri la
'fundamentoj' (ĉu al vi tiu ĉi vorto memoras ion?)
de interreto kaj koncernaj terminoj, kune kun rilata
etimologio. Pri ĝi recenzo en "Quotidiano naziona-
le" [nacia tagĵurnalo] tiel komencas: «Ĉi-rilate, kie
nun esperanto? Ĉu vi priatentis? Nun jam, ekde
jaroj kaj sen tiom da proklamoj, naskiĝis nova lin-
gvo, sed ĝi ne estas esperanto. Nova lingvo, kiu
kunigas homojn el la plej foraj landoj kaj el plej
diversaj kulturoj, antaŭ klavaro kaj ekrano, kaj ne
nur.»

Tamen, la defalo de la itala kunportas eĉ pli gravan
sekvon: laŭgradan perdon de propra identeco kaj
terura minaco ...

Popolo

malriĉiĝas kaj sklaviĝas

kiam al ĝi oni ŝtelas la lingvon.

Tiel skribis, en la bela sicilia dialekto, la poeto Igna-
zio Buttitta, en sia korporema versaĵo.

Ĉu pri io ankaŭ esperantistoj respondecas? Eble.

VIGLO

* *NPIV* (pĝ 147) flavbekulo ^(B) *Juna senspertulaĉo.*

*Vortaro Itala-Esperanto Minnaja – unua-jara uni-
versitato.*

LA LASTA ILIRA REĜO PLURESTAS EN ITALIO

Ekde la mezo de la tria jarcento antaŭ Kristo, dum 80 jaroj, en la Okcidenta Balkanio dominantis la reĝ-
lando de Ardianoj*. Ili forpelis keltojn trans la riveron Naron kaj subigis aliajn ilirajn reĝlandojn de Taulan-
toj kaj Enkeleoj, etendante la landlimojn sur la tuta Suda Ilirio. Post la reĝo Pleurato, kiu mortis en la jaro
251 antaŭ Kristo, la marŝipoj de iliroj de la reĝo Agrono kontrolis la tutan Adriatikan maron.

Post Agrono, la reĝino Teuta sukcesis subigi ankaŭ la reĝlandon de Epiro. En la jaro 229 ŝi klopodis ek-
okupi la grekajn koloniojn de Durrah kaj Isa, (hodiaŭ la urboj ĉe la albana marbordo), same subigis la insu-
lon de Korkura, (Korfuo), kio igis ŝian reĝlandon unu el la plej potenca en la Mediteraneo. Certe tio aperis
kiel minacaĵo de la aliaj du grandaj potencoj, Grekio kaj Romio. Ĉi lasta komencis la militon kontraŭ ĝin
(229-228) kio rezultigis pactraktaton pro perfido de unu el la iliraj generaloj (Dhimiter Fari). Tiu traktato
estis sufiĉe peza, ĉar fakte la reĝlando de Ardianoj reduktiĝis en malgrandan landon, norde de Lis (hodiaŭ
Lezhe). Tial, post la morto de Teuta, iliroj entreprenis duan militon kun Romo (219-218) kiu denove notis
malvenkon por iliroj. Sed Romo subskribis novan traktaton kun la tiutempa reĝo ilira Skerdilajdo, pro siaj
internaj problemoj urĝaj.

La tria kaj la lasta milito inter du Adriatikaj rivaloj (170-167, antaŭ Kristo), kiam regis Gent (ekde 181 a.K.
konata nuntempe interalie pro la fama medicinaĵo Genciana), finiĝis, malgraŭ la rezistado heroeca de la
lokanoj, per la definitiva venko de romianoj kiuj venigis la reĝon Gent en Italion sed traktis lin dignece.
Gent loĝis en la urbeto Gubbio (apud Perugia) pliajn 20 jarojn. Post lia morto, la romianoj starigis honore al
li maŭzoleon.

Mirinde, tiu maŭzoleo, kvankam modesta, spite al la invadoj kaj detruoj de pluraj barbaraj hordoj ankaŭ en
Gubbio, ankoraŭ plurestas kaj hodiaŭ ĝin vizitadas fojfoje albanoj ne nur loĝantaj en Italio. Ĝi iel transfor-
miĝis en pilgrimejon por albanoj, kiuj en la jaro 2004 aranĝis tie grandan dekhoran kulturalan manifestacion.
Mi bonŝancis vidi ĝin antaŭ nelonge okaze de mia restado ĉe mia filo Gent, laboranta en Gubbio. La maŭzo-
leo estas same ia simbolo de amikeco inter ambaŭ niaj malnovaj popoloj.

*(*ilira gento - iliroj estas la antaŭintoj de la hodiaŭaj albanoj*).

Bardhyl Selimi

INSULO DE LA ROZOJ, SENDEPENDA RESPUBLIKO ESPERANTA

Revolucia historio daŭrinta nur 55 tagojn, malmulte konata: granda neplenumita ideo, eĉ nun raviganta pro siaj strangaj kaj misteraj rilatoj.

La 1^{an} de majo 1968 — En la Adriatika maro, antaŭstrande de la urbo Rimini, tuj ekstere de la teritoria marlimo, la bolonja inĝeniero Georgo Rosa [roza] proklamas la sendependecon de mikronacio sur la fera platformo, kiun li mem projektis kaj konstruis. Tiel naskiĝas la "Esperanta Respubliko Insulo de la Rozoj" laŭ la nomo en esperanto, oficiala lingvo de la ĵus naskita ŝtato, kiu eĉ nomumis "ambasadoro"-n, inĝ-ron Rudy Wolfgang Neumann, germanan entrepreniston. Tujuje la mikronacio fariĝas afero nacia kaj internacia, estigante kaj egajn timojn kaj esperojn, revojn.

Politikuloj samkiel aŭtoritatoj ektimas pro estiĝo de nova internacia subjekto kelkmejele antaŭ la itala marbordo. Ekas enketoj, prezentiĝas parlamentaj demandoj: iu vidas malantaŭ la "Insulo de la Rozoj" la ombron de fremda nacio — memoru la tiaman etoson de la Malvarma Milito; aliuloj ektimas starigon de kazino, kun hazardludoj kaj logistinoj, atenco al moralo: fakte dum la jaro 1968 okazis en la okcidenta Eŭropo sociaj tumultoj, precipe studentaj.

Aliflanke la turismaj entreprenistoj, samkiel la administrantoj de la urbo Rimini, favore taksas la "Insulo"-n, kiel neantaŭvideblan turisman allogaĵon: la somergastoj viciĝas por akiri lokon sur boatoj kiuj ĉirkaŭnavigas la platformon kaj preskaŭ freneze aĉetas la poŝtmarkojn de la nova ŝtato, kiel originalan ferian memoraĵon.

Eĉ UEA entuziasme aplaŭdas la iniciaton, ĉar la nova ŝtato adoptis, kiel oficiala, la lingvon internacian. Krome la "Insulo" fariĝas somera NOVAĴO por presagentejoj, ĵurnaloj, revuoj kun raportaĵoj, enketoj, intervjuoj kaj fotoj de belegaj junulinoj, bikine malvestaj.

Depost 55 tagoj de la sendependa proklamo, la itala Ŝtato decidas firman intervenon. La insulo embargiĝas, kun sekva militista okupado. Poste la platformon sturmas mararmejaj eksplodistoj: persone mi konatiĝis kun "karabenisto" ⁽¹⁾, kiu dum ses monatoj estis inter la okupantoj de la platformo.

La 25^{an} de februaro 1969 la maro englutas la insulon.

De tempo al tempo tiu evento de la "Insulo de la Rozoj" unuarangiĝas. Bando de Romanjaj muzikistoj inspiriĝis el la historio de la platformo por "hip-hop"-a peco, kiu gajnis eĉ festivalon.

Somere 2008, Vancuvera Muzeo en Kanado starigis instalaĵon celebrantan la eventon, ankaŭ rilate la insulon "Utopia" de la filozofo Tommaso Moro. Pri la historio publikiĝis eĉ bildstria albumo. La pasintan 1^{an} de julio, en Rimini okazis premiero de la kulturfilmo "Insulo de la Rozoj — La libero timigas", rezulto el unujara esploralaboro kaj 40 horoj de filmado.

Sed la "Insulo de la Rozoj" ne estas ununura mikronacio en la mondo. En la Norda Maro staras la "Princolando de Sealand", same sur platformo, unu el la pluraj konstruitaj dum la 2-a Mondmilito cele al defendo kontraŭ aviadilaj kaj misilaj (la famaj V2) atakoj al Londono. Tiu ĉi princolando ne pereis kaj eĉ nuntempe bone funkcias kiel turisma loko. Pliajn informojn donas la retejo: <http://www.sealandgov.org/history/html>.

Do, la ideo de inĝ-ro Georgo Rosa ne estis tro ekstravaganca: ĝi nur anticipis la nuntempajn surmarajn konstruadojn de hotelo en Dubai kaj de japana flughaveno. Kaj nun, pli ol okdekjarulo, li prave povas orgojli eĉ se, pripense la tutan historion, amara rideto aperas sur lia vizaĝo.

VIGLO

⁽¹⁾ "Karabenistoj" estas fako, kiun en 1814 starigis reĝo Vittorio Emanuele 1-a; ekde 1861 ĝi partoprenas en la itala armeo. Nuntempe funkcias kiel civila, militara kaj juĝa polico, flanke de la ŝtata polico.



"Gogo la testudo" - originale esperantlingva bildstrio-serio de Martin Weichert, kreita en 1987

Testudo revenas hejmen el la trinkejo malfruan vesperon, kiam atakas kaj rabas lin tri limakoj.

Li raportas la aferon. Policisto notas la nomon, adreson, horon, kaj tiam demandas:

- Do, ĉu vi povas diri al mi kio okazis?

- Vere ne, ĉio okazis tre rapide! - respondas la testudo.



Triesto kaŝita

Historiaj Ŝildoj

Historion pri Triesto eblas ekkoni ankaŭ pere de la memortabeloj fiksitaj sur fasado de urbaj palacoj. Sur la domo de strato *Amilcare Ponchielli* n-ro 3, ĉe angulo kun strato *S. Lazzaro*, staras ŝildo kie legeblas la jeno: "En ĉi domo Triesto aklamanta akceptis generalon *Menotti Garibaldi* ekde la 5^a ĝis la 7^a de septembro 1899, tagoj arde memorindaj".

Menotti (1840-1903), unua filo de la "heroo de la du mondoj" *Giuseppe Garibaldi* kaj de *Anita* (*Ana Maria de Jesus Ribeiro*), partoprenis, flanke de sia patro, en ĉiuj militkampanjoj de la nacia releviĝo, ekde la ekspedicio de la Milo ĝis la dua milito por sendependeco. Li venis al Triesto sekve de invito de iredentistaj rondoj: dum lia tri-taga restado, okazis eksterordinaraj patriotaj manifestacioj. Pro tio, per tiu tabelo, oni deziris ke restu al la posteuloj spuro pri tia evento, kiu tiam estigis flamajn emociojn en la animoj de la tieanoj sopirantaj al reunuiĝo kun la itala regno.

Sed kromaj ŝildoj, starantaj sur aliaj domfasadoj, menciindas: En strato *Fonte Oppia*, tiu pri la romia akvodukto: tie alfluis la akvoj de la rivero *Rosandra*; sur la Palaco *Brigido*, proksime de placo *Unità d'Italia*, kiu rememoras pri restado de Napoleono dum la jaro 1797; sur la monteto *Sankta Justo*, sur domo *Regensdorf* en strato *Rota*, pri vizitoj de imperiestrino Elisabeth kaj princo Rudolf en la dua duono de 1800. Ĉiuj atestas pri la plurfaceta kaj kompleksa historio de Triesto.

Cepoj en Triesto

Unu el la plej kuriozaj vilaoj en la ĉirkaŭaĵoj de Triesto, estas la "Vilao de l' Cepoj" en la kvartalo *Barcola*, aleo *Miramare* 229. Tiu ĉi impona konstruaĵo, russtila, estis starigita en 1896 de eksa popo, *Anton Jakic*, kiu, laŭ fidinda populara diraĵo, estis sekreta agento (sed ne tiom sekreta!) de la caro. La stilo ŝajne omaĝas al la ... rubloj per kiuj – tre probable – tiu *Jakic* estis rekompencita. Kontraŭ tiu domo, kiu tute malharmoniiis kun la ĉirkaŭanta pejzaĝo, tondre esprimis sian opinion prof-ro *Alberto Puschi* (1853 - 1922), arkeologo kaj direktoro de la urba Muzeo pri antikvaĵoj en Triesto: "... inter tiom da malbelaĵoj ĝuste mankis ĉi moskvaj cepoj, kiujn iu revanto pri siberiaj kuniĝoj strebas kultivi sur ĉi grundo..." La vilao estis vendita de la proprietulo en 1904: post li, ĝi havis plurajn aliajn posedantojn. Dum iu periodo, ĝi iĝis tre fama kaj eleganta voluptejo kaj eĉ internacie konata hazardludejo.



Enketo pri la bildo de UEA en Esperantujo

SEG estas faka grupo de sociosciencistoj, kiu volas fari esploron pri la bildo de UEA en Esperantujo. Pro tiu celo oni instalas enketon en interreto (iuj jam ricevis paperan enketilon en Bjalistoko). Ĝi estas respondebla en proksimume 20-30 minutoj.

Ĉu vi pretas helpi pri la esplorado? Bonvolu plenigi la enketon en interreto. Ne necesas esti membro de UEA (oni aparte volas aŭdi opiniojn de nemembroj) kaj ĝi ankaŭ ne varbas por UEA. La opinioj kaj personaj informoj, kiujn vi indikos, estos uzataj nur por esplorado kaj la rezultoj estos uzataj nur en maniero, kiu ne ebligas rekoni individuon respondinton.

La enketon administras Zbigniew Galor kaj Jukka Pietiläinen.

Vizitu

<http://enketo.shortURL.com>

Bonvolu disvastigi kiel eble plej la informon pri ĉi enketo inter geamikoj, konatuloj ktp.

Jukka Pietiläinen

jukka.p@esperanto.fi

La konata franca esperantisto kaj entreprenisto **Michel Basso** konstruos en aŭtuno 2009 du belajn, grandajn monumentojn: "ESPERO" kaj "ESPERANTO" en Herzberg am Harz (Esperanto-urbo, Germanio).

Por esprimi la mondan solidarecon al la oficiala Esperanto-urbo, Herzberg am Harz, por la betonkrustoj de la monumentoj estas akceptataj ŝtonetoj el la tuta mondo ankaŭ de individuoj, kaj ankaŭ de formalaj Esperanto-organizaĵoj (klubo, asocio, instancoj).

Multaj ŝtonetoj jam alvenis el diversaj landoj kaj famaj lokoj, ekz. vitra fragmento kaj ŝtonetoj de la fama Esperanto-platsen en Gotenburgo en Svedio, el Jerusalemo, Hiroshima, ktp.

Se vi volas kapti la okazon kaj kontribui per simbola konstruero al la monumentoj, sendu ŝtonetojn aŭ eble vitraĵeton aŭ iun tiaĵon el via urbo/loko/regiono.



Kun la ŝtoneto bonvolu menciivan nomon kun loĝloko kaj lando, la trovlokon, specion de la ŝtono kaj similajn sciindaĵojn. Estas bonvenaj eĉ eventualaj interesaj rakontetoj, ligitaj al la sendata ŝtoneto: oni zorgos pri preciza dokumentado de ĉiajn alveninta in-

formo...

Diversaj ŝtonetoj estis jam transdonitaj dum la UK al Peter Zilvar, Zsófia Kóródy kaj Harald Schicke.

Nun oni sendu ilin, prefere per poŝte, al:

Germana Esperanto-Centro/
Interkultura Centro Herzberg

Grubenhagenstr. 6,

D-37412 Herzberg/Harz

Tel: +49/(0)5521-5983

<http://esperanto-urbo.de>

Ankaŭ ŝtoneto el Triesto donos sian kontribuon en la konstruo de tiuj du monumentoj.


El Esperantujo: diverstemaj kaj diverslandaj informoj

DIABOLIK ESPERANTE!

La unua rakonto "La reĝo de la teroro" nun en esperanto, realigita de Alfredo Castelli kaj Giuseppe Palumbo, eldone de Edistudio.

Temas pri 144 paĝoj, kun la unua historio de tiu genio de l' Malbono. Aldonitaj estas slipoj prezentantaj la evoluon de tiu ĉefrolanto kaj la kolektemulan mondon ĝin rivoluantan.

La libro aĉeteblas ĉe Edistudio, Itala E-Federacio kaj Itala E-Junularo, kaj baldaŭ ĝi aperos ankaŭ ĉe la budoj de "Diabolik-Klubo" okaze de la foiroj pri bildstriaĵ gazetoj.



Informojn liveras:

www.edistudio.it; www.esperanto.it; iej.esperanto.it

Koncerto de JoMo en Italio

La kantisto JoMo (Jean-Marc Leclercq), tre bone konata tra tuta Esperantujo pro sia kapablo amuzi la publikon kantante en pluraj lingvoj (pli ol 26 – Guinness-Rekordo!) koncertos en Chiavari (Ĝenovo) en subĉiela teatro (Parko Villa Rocca) la 26^{an} de septembro. La koncerto estas organizita de Gruppo Esperanto Tigullio okaze de la Eŭropa Tago de Lingvoj, aŭspicie de Eŭropa Konsilio.

Dum la koncerto eblos aŭskulti kanzonojn en la loka dialekto. La celo estas per altkvalita manifestacio festi la Eŭropan Tagon de Lingvoj kaj atentigi la publikon pri la riĉeco de nia lingva posedaĵo kaj, samtempe, sentemigi pri bezono ĝin protekti.

Pluaj informoj riceveblas ĉe ttt-ejo de la Gruppo Esperanto Tigullio: <http://tigullio.esperantoitalia.it> kaj de Eŭropa Konsilio: <http://edl.ecml.at/>

Kune kun la 11^a eldono de la revueto **Brazilei**, la sekcianoj kaj abonantoj ricevis kroman 60-paĝan broŝuron. La speciala eldono entenas la liston de landnomoj freŝdate ĝisdatigitan de la Akademio de Esperanto plus serion da kvar artikoloj verkitaj de la akademiano Bertilo Wennergren – cetere Direktoro mem de la Sekcio pri Ĝenerala Vortaro – kiu analizas la ĝisdatigojn fare de la Akademio.

La artikolojn **Brazilei** aldonis pro la valoraj kaj ekvilibraj argumentoj de la aŭtoro pri tiel tikla punkto de nia lingvo. Ili unuafoje publikigis en la vizitinda retejo www.lingvakritiko.org.

La papera versio de la broŝuro Landnomoj estas ekskluzivaĵo de la sekcianoj kaj abonantoj de **Brazilei**, sed PDF-versio de la verketo estas libere elŝutebla el ilia retejo. Musklaku ĉe <http://ileibr.org/brazilei/tag/landnomoj> por elŝuti ĝin.

Interesiĝantoj akiri la libroversion, turni sin al la librotutiko de **Brazilei**, baldaŭ malfermiĝanta.

Ni konsilas viziti kaj trastudi la riĉan novan retejon <http://ileibr.org/brazilei>.

Por la 13-a fojo UEA disdonos subvenciojn de la Biblioteka Apogo Roma kaj Poul Thorsen al Esperanto-bibliotekoj. Rajtas proponi sin bibliotekoj, kiu ne estas subtenataj de ŝtata, urba aŭ alia publika instanco. Oni sendu priskribon pri la biblioteko kaj liston de dezirataj libroj laŭ ordo de prefero. Diskoj, vidbendoj, k.a. ne-libraj varoj ne estos konsiderataj. Subvencion oni ricevos kiel librojn laŭ la listo, kiu akompanis la peton. Pasintjare estis subtenitaj ses bibliotekoj je la valoro de 160-265 eŭroj.

La petoj atingu la Centran Oficejon de UEA ĝis 2009-10-15 papere (Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando) aŭ rete al direktoro@co.uea.org.

Kun la vivo kaj agado de la Esperanta poeto Poul Thorsen (1915-2006), kiu kun sia edzino donacis la bazan bonhaston de la fondaĵo, eblas konatiĝi per la retejo www.pulthorsen.dk.

Marcos Cramer kaj Renato Corsetti informas pri Vikia projekto por "Bonlingva Vortaro"

"La Bonlingva Vortaro estas projekto por krei vortaron, kiu ne nur listigos radikojn kaj kunmetaĵojn kun iliaj signifoj, sed ankaŭ mencias informojn pri la uzindeco kaj la lingvostila nivelo de la radikoj kaj kunmetaĵoj. Kiel bazon por tiaj kriterioj de uzindeco ni uzas ĉefe la ideojn esprimitajn en la verko "La bona lingvo" de Claude Piron. Laŭ tiuj kriterioj, multaj nenecesaj novradikoj el PIV kaj el aliaj fontoj estos markitaj evitindaj, kaj estos montrataj taŭgaj kunmetaĵoj por anstataŭigi tiujn novradikojn. Tiel ni subtenas pli facilan Esperanton, kiu restas fidela al la reklamaj eldiroj de la Esperantistoj, ke Esperanto facilas interalie pro la ebleco esprimi multon per malmultaj radikoj kaj eleganta vortfarado.

La unua versio de la vortaro kombinos materialon el la **Reta Vortaro** kun la rekomendoj kolektataj en la listo de **SIMPLAJ SAMSIGNIFAJ VORTOJ** gvidata de Renato Corsetti. Por krei tiun unuan version, ni tamen ankoraŭ serĉas kunlaborantojn. La Bonlingva Vortaro (retpaĝaro ĉe <http://vortaro.wikikii.com>) estas interreta vortaro, kiu funkcias per vikio. Tio signifas, ke simile kiel la Vikipedion, ĝin povas facile redakti ĉiuj interretuzantoj. Marcos Cramer, la iniciatinto de la Bonlingva Vortaro, programis komputilan programon, kiu aŭtomate transprenis la materialon el la Reta Vortaro al la Bonlingva Vortaro (tion permesas la kopirajta permesilo de la Reta Vortaro). Lia komputila programo tamen intence ellasis tiun materialon de la Reta Vortaro, kiu tuŝas la novradikojn traktatajn en la listo de Simplaj Samsignifaj Vortoj.

Nun venas la sekva paŝo en la kreo de la Bonlingva Vortaro: Krei artikolojn kiuj traktas tiujn radikojn, kiujn malrekomendas la listo de Simplaj Samsignifaj Vortoj. Tiu laboro ne povas esti farata aŭtomate, do necesas kunlaborantoj por plenumi ĝin. Ĉiu, kiu emas kunlabori pri ĉi tiu laboro por antaŭenigi la Bonlingvan Vortaron, anoncu sin ĉe Marcos Cramer: marcos.cramer@gmail.com"

Rekomendindas vizito al tiu ttt-ejo, precipe se vi ŝatas simple kaj facile, elegante kaj racie, esprimi vin en la Bona Lingvo!

Septembra Programo	
01 mardo	19h30 Alveno de gasto el Aŭstrio
04 vendredo	19h30 - Renkontiĝo kun nia gasto
08 mardo	17h00 - Posttagmeza renkontiĝo* Kune ni lernu kaj ... amuziĝu!
11 vendredo	20h00 - Pri UK kaj Nacia Kongreso
15 mardo	17h00 - Posttagmeza renkontiĝo
18 vendredo	20h00 - Venontjaraj aranĝoj: kongresoj kaj agado en Triesto
22 mardo	17h00 - Posttagmeza renkontiĝo
25 vendredo	20h00 - Prilaborado de ekspozicio pri LLZ
29 mardo	17h00 - Posttagmeza renkontiĝo

Oktoobra Programo	
02 vendredo	20h00 - Prezento de IFEF-prelegoj
06 mardo	17h00 - Posttagmeza renkontiĝo
09 vendredo	20h00 - Legado kaj komentado de "Sonĝe sub pomarbo" (J. Baghy)
13 mardo	17h00 - Posttagmeza renkontiĝo
16 vendredo	20h00 - Prilaborado de ekspozicio
20 mardo	17h00 - Posttagmeza renkontiĝo
23 vendredo	20h00 - TEA alitempe: dia. de Anita
27 mardo	17h00 - Posttagmeza renkontiĝo
29-30-31	IPERPORTI - speciala programo ĉe Kafejo S. Marco kaj Salono de la Lernejo por tradukistoj kaj interpretistoj. Detaloj alvenos baldaŭ!

***Novaĵo en Tea: marde, renkontiĝoj je la 17^a horo.** Celo estas nur paroli en kaj pri Esperanto, klopodi klarigi gramatikajn problemojn, ekzercadi sin per diverstemaj taskoj, paroli kaj paroligi pri aktualaĵoj, laŭ viaj temoj kaj/aŭ interesoj, legi literaturaĵojn de esperantaj verkistoj, originalajn aŭ tradukitajn, solvi eĉ krucvortajn enigmojn, kune pretigi artikolojn por Vikipedio (kio ĝi estas?) kaj fari kion ajn vi deziras: gravas nur ke ĉio okazu en Esperanto. Ĉu vi estas komencanto aŭ komencinto aŭ progresanto, tute ne gravas: neniu estos, dum niaj renkontiĝoj, "la surpodia profesoro" - ĉiuj, pli-malpli, staras samnivele, ĉar ĉiu ajn el ni bezonas ion pli scii!

12^a Internacia Fotokonkurso

Post dek unu sukcesaj konkursoj (1998-2008) la redakcio de LA ONDO DE ESPERANTO invitas al partopreno en la ĉijara Internacia Fotokonkurso. Ĉiu fotemulo, amatora aŭ profesia, rajtas partopreni sendepende de la loĝlando kaj lingvokono. Unu persono rajtas partopreni per maksimume kvin fotoj. La minimuma formato estas 15x20 cm. Fotoj povas esti koloraj aŭ nigra-blankaj, vertikalaj, horizontalaj kaj aliformataj. Ne akceptataj tiuj senditaj elektronike. Sendu la konkursajn fotojn al la sekretario de la konkurso, Halina Gorecka (RU-236039 Kaliningrad, ab. ja. 1205, Ruslando), antaŭ la 1^a de decembro 2009.

La konkursaĵoj devas esti subskribitaj per pseŭdonimo. En aparta koverto kunsendota devas esti slipo kun la pseŭdonimo, aŭtentika nomo, poŝta adreso kaj retadreso (se estas) de la aŭtoro. Oni povas aldoni al la fotoj titolon aŭ klarigan noton. En la konkurso ne rajtas partopreni fotoj jam premiitaj aŭ publikigitaj.

Jen la premioj, disdonotaj de la juĝkomisiono:

1. 50 € kaj abono de LA ONDO DE ESPERANTO en 2010.
2. 25 € kaj abono de L.O.D.E. en 2010.
3. abono de L.O.D.E. en 2010

Speciala premio (50 € kaj abono de L.O.D.E. en 2010) por la plej bona foto pri la temo "Infanoj".

Ĉiu premiito ricevos diplomon. La rezulto estos anoncita en L.O.D.E. La organizanto de la konkurso havos ĝis la 31^a de decembro 2011 ekskluzivan rajton uzi la ricevitajn fotojn en papera kaj elektronika formo kaj en ekspozicioj. Poste la publikigo-raĵton havos kaj la organizanto kaj la aŭtoroj. Legu pli la antaŭaj Internaciaj Fotokonkursoj kaj vidu plurajn el la premiitaj fotoj en la retejo:

<http://www.esperanto.org/Ondo/Ind-fk.htm>

2^a Literatura Konkurso

Esperanto-Centro Torino, memore de Renato Pennazio, veterana Torina esperantisto, starigas duan literaturan konkurson pri la temo:

"KIOM VOJAĜO INFLUIS EN MIA VIVO"

Regularo de la konkurso:

- La teksto estu mallonga novelo aŭ rakonto, maksimume 5 paĝojn longa, originale verkita en esperanto; maksimuma amplekso de ĉiu paĝo: 30 liniojn.

- La verkojn oni sendu tri-kopie, antaŭ la 28^a de februaro 2010, en fermita koverto, al:

Rosanna Perottino - Via Alfano 1 - 10154 Torino
La verkoj, neniam eldonitaj, devas esti subskribitaj per kaŝnomo. En aparta fermita koverto la verkisto indiku siajn nomon, adreson, telefonnumeron, ret-adreson, ktp.

Eblas sendi la verkojn per ret-poŝto al:

zorion99@libero.it

En tiu ĉi kazo la sekretiariino de la konkurso garantias pri la anonimeco.

La juĝataron de la konkurso konsistigos tri torinaj esperantistoj. Oni premios la 3 plej bonajn verkojn per senpaga aliĝo al la Itala Esperanto-Kongreso 2010 kaj diskonigo de la verkoj pere de esperantistaj kanaloj.

Pri la verkoj publikigitaj la organizantoj ne rekonos kopirajtojn. La organizantoj garantias ke, laŭ la aktuala leĝaro, oni utiligos la identigajn datumojn de la verkistoj nur por la konkursaj celoj.

BULTENO de TRIESTA ESPERANTO-ASOCIO

Redaktanto: Elda DOERFLER - testudo.ts@gmail.com

Sidejo: Via Coroneo 15 - Trieste - marde 17-19; vendrede 19-21

tel/fakso: (+39) 366 1720440 - 040 350093; 339 2226936

Reto: esperantotrieste@yahoo.it; nored@tiscalinet.it

Grupa tt-ejo: [//it.groups.yahoo.com/group/Associazioneesperantistatristina](http://it.groups.yahoo.com/group/Associazioneesperantistatristina)

Poŝta adreso: CP 601 Trieste Centro IT-34132 Trieste - Italio

Poŝtĉekkonto N° 10834349